

N. N. 32,
Burĝonis rozarbedo

tradukita de Guido Holz

1. Burĝonis roz-arbedo
el delikata sin'
laŭ olda kant-heredo,
Jiŝaj la origin';
ekĝermis ĉarma flor'
dum frosta vintro-tempo
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,
mirinda roz-arbed',
elvenis flor' benata
laŭ diro de profet'.
Laŭ sankta Di-ordon'
ŝi naskis infaneton
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,
amindas per parfum';
la nokton ĝi forpelas
per sia brila lum',
nin helpas el mizer',
el pek' kaj morto savas;
Li, hom' kaj Di' en ver'.

*Traduko de la Germana poemo
"Es ist ein Ros entsprungen"
de N. N. 32 en Esperanton de
GUIDO HOLZ (*1920 - †1989).*

*Arg-618-1245 (2014-09-07
14:38:29)*

*Tiu ĉi kanto troviĝas en
la eklezia Esperanta kant-
libro "Adoru", n-ro 223.
Vidu ankaŭ la retejon
<http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burĝon1.html>. Pri
Guido Holz vidu la retejon
http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.*

N. N. 32,
Elkreskis roz-
branĉeto

*tradukita de Joachim
Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloreto'
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

*Traduko de la Germana poemo
"Es ist ein Ros entsprungen"
de N. N. 32 en Esperanton
de JOACHIM GIESSNER
(*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Arg-618-1244 (2012-10-18
21:24:22)*

*Tiu ĉi poem-traduko tro-
viĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub
<http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

N. N. 32,
Es ist ein Ros entsprungen

1. Es ist ein Ros entsprungen
aus einer Wurzel zart,
wie uns die Alten sungen,
von Jesse kam die Art
und hat ein Blümlein bracht
mitten im kalten Winter,
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,
davon Jesaja sagt,
ist Maria die reine,
die uns das Blümlein bracht.
Aus Gottes ewgem Rat
hat sie ein Kind geboren
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so kleine,
das duftet uns so süß,
mit seinem hellen Scheine
vertreibt's die Finsternis:
Wahr' Mensch und wahrer Gott,
hilft uns aus allem Leide,
rettet von Sünd und Tod.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas
N. N. 32.*

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la
germana evangelia eklezia kantlibro,
kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon
http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen. -
La teksto troviĝas ankaŭ en la rete-
jo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla
ankaŭ la melodio.*